



MALGRANDA

REVUO

N:RO 1

1948

6-a JARO

PREZO: 1.- Kr.

ENHAVO:

| | Paĝo |
|---|------|
| LA SAMARIANOJ de Kohen-Cedek | 1 |
| KIEL BLEKAS LA HUNDETO de L. C. Deij | 7 |
| 'LA SORTO DE RICHARD MAHONY', de F. R. Bonham ... | 12 |
| VIA DEZERTIGITA KORO de H. N. Bjölik | 16 |
| RECENZISTA DILEMO de S. Engholm | 16 |
| SUR LA LUNO de Gido R. Emfeld | 19 |
| HOMA TRAGEDIO de G. J. Degenkamp | 23 |
| LA MALNOVA BONA TEMPO de Einar Hult | 25 |
| KOMENTO | 27 |
| LITERATURO | 30 |

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinko Kk.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalemo.
Polujo: R. Sakowicz, Warszawa (21) — Okecie.
Portugalujo: Sro Saldanha Carreira, Av. Grão Vasco, 33, r/c, Benfca-Lisboa.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

N^o 1

6^a JARO

1948

La samarianoj De KOHEN-CEDEK, Jerusalemo



Nablus (Shechem) kaj la monto Gerizim.

"... ne eniru en urbon de samarianoj."
Mateo 10:5.

Ĉu vi memoras, leganto, la belan evangelian parabolon pri la bonfara samariano, rankontitan de Luko (ĉap. 10)? Ĉu vin interesas la historia sorto de tiu gento? Se jes, ni eniru en ilian urbon por konatiĝi kun ili. La supre menciita malpermeso ne rilatas al ni. Ĝi estis ordono al la apostoloj, kun aldono: "Iru prefere al la perditaj ŝafoj de la domo de Izrael." Sed la lasta epiteto konvenas ĝuste al ili, al la samarianoj.

Inter du montoj, la ĉiam verda Gerizim kaj la ŝtongriza Eval, en pitoreska valo, situas la antikva urbeto Ŝeĥem, unu el la plej antikvaj urboj de Palestino. Ĝi estas menciita eĉ sur la skribplatoj de Tel el-Amarna, tie nomata Ŝakhmi.

La bibliŝatantoj memoras tiun urbon el la Genezaj rakontoj. En la urbo Ŝeĥem tendis Abraham veninte en la Promesitan landon, kaj ĉi tie li akceptis la ĵuron: "Al via idaro mi donos ĉi tiun teron!" (Genezo 12). Ĉi tie okazis al Jakob familihonora ofendo, poste sange venĝita (Genezo 34). Proksime al tiu ĉi loko estis ĵetata en puton lia filo Jozef (Genezo 37), kiu estis poste ĉi tie entombigata (Josuo 24). Ĝuste tie ĉi, sur la monto Gerizim, testamentis Josuo antaŭ sia morto al la popolo de Izrael siajn lastajn ordonojn (Josuo 24). En Ŝeĥem fiaskis la aventura provo fondi la unuan heredan reĝecon en Izraelo (Juĝistoj 9). Tie ĉi estis dividata la regnon de Salomono en la reĝlandojn Judujo kaj Izraelujo (Reĝoj I, 12). Dum 50 jaroj restis Ŝeĥem la ĉefurbo de la lastenomita lando. Poste fariĝis reĝorezidejo la apuda urbeto Ŝomron, greke nomata Samaria, kiu transdonis sian nomon al la tuta distrikto kaj al ĝiaj loĝantoj.

Kiam Ŝalmaneser, la reĝo de Asirio, ekzilis la izraelidojn (722 a. Kr.) li "transkondukis homojn el Babel, Kut, Ava, Ĥamat kaj Sefarvaim, kaj ekloĝigis ilin en la urboj de Samario anstataŭ la izraelidoj" (Reĝoj II, 17). La alvenintoj miksiĝis kun la lasitaj izraelidoj. Ili akceptis la Moscan leĝaron sed konservis tamen siajn antaŭajn ritojn. La novan miksgenton oni nomis samarianoj.

La judoj revenintaj el la babela ekzilo en la tempo de Ezra (536 a. Kr.) ne akceptis en siaj rondoj la samarianojn pro iliaj idolanaj kutimoj, kiujn ili konservis, kaj rifuzis al ili partoprenon en la rekonstruo de la templo en Jerusalemo. "Vi havas nenian parton, nek rajton, nek memoron en Jerusalemo!" diris Neĥemja al la estroj de Samario (Neĥemja 2:20). De tiam regis akra antagonismo inter la du popoloj. La samarianoj sub estreco de Sanbalat konstruis por si apartan templon sur la monto Gerizim, kaj al pastro de aaronida deveno estis donata la pontifika ofico. De tiam Ŝeĥem fariĝis la religia kaj

politika centro de la samarianoj, kaj la monto Gerizim fariĝis simbolo de plej alta sankteco.

Nur kelkajn jarcentojn daŭris relativa sendependeco kaj historia glorperiodo de la samaria popolo, nur dum la superregado de la epigonaj Seleŭkidoj. Johananano Gyrkanos, la reganto de Judujo (el Makabea dinastio), konkeris Samarion kaj detruis la templon sur Gerizim (129 a. Kr.) Tio pliakrigis la malamon de la samarianoj al la judoj ĝis tia grado, ke judo devis eviti survoje trairi samariajn urbojn. Jesuo trapasis survoje al Jerusalemo vilaĝon de samarianoj, "Kaj tiuj lin ne akceptis, ĉar lia vizaĝo estis direktata al Jerusalemo" (Luko 9:52). Sole tio, ke iu iris al Jerusalemo, al la konkuranta sanktejo, sufiĉis, por ke li estu nedezirata en Samario.

La roma imperiestro Vespasianus Flavius, konkerinte Samarion, ekzektis 11.000 samarianojn sur la monto Gerizim kaj detruis iliajn religiajn skribaĵojn. Konkerinte la urbon Ŝeĥem li ordonis, ke ĝi de tiam portu lian familian nomon: Flavia Neapolis — Novurbo de Flavius. De ĝi venas la nuna araba nomo de Ŝeĥem, Nablus (la araboj ne elparolas la sonon p sed anstataŭas ĝin per b). La nunaj okupantoj de Palestino, la angloj, oficialigis tiun nomon anstataŭ la originan.

Dum la bizantia reĝepoko ekribelis la samarianoj pro la netolereblaj persekutoj. La imperiestro Justiniano 529 p. Kr. dronigis la ribelon en sangondo, detruis la urbon Ŝeĥem kaj dispelis la plejmulton de ĝia loĝantaro. Parto el ili rifuĝis en Persujon, parto estis perforte kristanigata, kaj nur malmultaj restis obstine fidelaj al siaj ritoj. Ili mizere pluekzistadis post la araba invado, malgraŭ la konstantaj persekutoj de la islamaj regantoj, kaj ili obstine kontraŭstaris ĉiujn provojn mahometanigi ilin. Multe ili suferis de la krucmilitoj, de mamelukoj, mongoloj kaj ceteraj invadantoj. Multaj samarianoj pereis dum la internaj militoj tra la tutaj 16a kaj 17a jarcentoj. Dum plifortiĝis la araba influo, kaj ili akceptis multajn arabajn morojn. La araba lingvo fariĝis ilia hejma lingvo. Je la komenco de la nova tempo ekzistis ankoraŭ samarianaj komunumoj en multaj lokoj ekster la propra samaria distrikto: en Ĉezareo, en Gaza, Jaffa, Damasko kaj Kairo. Sed la islamaj persekutoj dum la 17a kaj la 18a jarcentoj iom

post iom malaltigis ilian nombron, ĝis ĝi atingis katastrofajn ciferojn.

La nombro de la samarianoj estis:

| Jaro | Laŭ | Viroj | Virinoj | Kune |
|------|------------------------|------------|---------|---------|
| 1838 | J. Robinson | 30 | | |
| | | plenaĝuloj | ? | 150 |
| 1850 | A. Frankl | — | — | 152 |
| 1872 | — | — | — | 135 (!) |
| 1882 | — | — | — | 160 |
| 1901 | — | 97 | 55 (!) | 152 |
| 1909 | prof. Kahle | 97 | 76 | 173 |
| 1922 | oficiala kalkulo | 83 | 80 | 163 |
| 1931 | " " | 93 | 89 | 182 |
| 1940 | neoficiale | 99 | 93 | 192 |

El ili 160 — 79 viroj kaj 81 virinoj — loĝas en la malriĉa kvar-talkorto Harit a-Samra (arabe: Samaria korto) en Ŝeĥem kaj dividiĝas en kvar grupojn:

1. familio Hamulath al-Danaf, devenanta laŭ aserto de la Efraima tribo;
2. familio Cabaĥia, de la Menasea tribo;
3. familio Mufaraĝia Marlib (verŝajne de asiria deveno);
4. Ĉefpastra familio, el la tribo de Levi.

En la jaro 1624 mortis la lasta samariana pontifiko-aaronido (devenanta de Aaron, la frato de Moseo). De tiam la spirita gvido de la popolo transiris al levido (ano de la pastra tribo de Levi). La nuna ĉefpastra familio laŭ sia severe gardata genealogia listo devenas de Uziel, filo de Kehat, la levido (Eliro 6:18).

Dum la lastaj kvardek jaroj, kiel montras la supra tabelo, la nombro de la samarianoj altiĝis nur per 40 personoj — stato katastrofa por la gento, kvankam en 1872 la stato estis eĉ pli danĝera. Sed feliĉe pliboniĝis dume iomete la ciferaĵoj rilatoj inter la seksoj. En 1901 tiuj estis eĉ ne ekzistebligaj, kiam la nombro de virinoj estis nur 56 % rilate al viroj kaj 31 rilate al la tuto. Kvankam la religio permesas poligamion, la samarianoj ne povas praktiki ĝin. Ofte okazis, ke plenaĝa viro, kiu

dote akiris fianĉinon — ankoraŭ infaninon — devis atendi pli ol dek jarojn ĝis ŝia maturiĝo, por povi konduki ŝin en sian domon kiel edzinon. Ofte okazas aĝe malegalaj edziĝoj, same kiel neeviteblaj proksimparencaj edziĝoj. Ambaŭ faktoroj malfavore efikas al la eŭgeniko de la gento. La nombra degenero de la samarianoj dependas tamen unuavice de la sangaj persekutoj de kristanoj kaj poste de islamanoj.

Kreskon de la popolo malhelpas nuntempe ankaŭ malfavoraj ekonomiaj cirkonstancoj en medio tre neprogresema. Ili okupiĝas pri plej simplaspecaj manmetioj, kiel riparo de ŝuoj kaj tapiŝoj, pri servlaboroj kiel strataj ŝupurigistoj kaj portistoj, pri strata etkomercado. Nur la pastraro iom pli profitas, precipe per reskribado sur pergamento de preĝoj, vendataj al turistoj kaj ŝatantoj de kuriozaĵoj.


La sanktaj skriboj de la samarianoj konsistas el nur la kvin Moseaj libroj kun la libro de Josuo, filo de Nun. Aliajn bibliajn librojn ili ne rekonas. Eĉ pli: ili traktas ilin kiel falsadon de la ĝusta historio. La samarianoj nome kredas, ke ili estas resto de la Efraima kaj Menasea triboj, kiu restis en sia hejmcentro apud la templo, kiun, laŭ ilia aserto, Josuo mem konstruis sur la monto Gerizim. Sed la pastro Eli — laŭ samariana aserto — translokis la centron al la urbo Ŝilo (Samuel I,1). De tiam la izraelidoj estas dividitaj en du partojn. La triboj de Efraim kaj Menase restis fidelaj al la sanktejo de Gerizim, dum la ceteraj poste proklamis Jerusalemon kiel sian sanktan centron.

La samariana teksto de la Moseaj kvin libroj diferencas de la juda (do ankaŭ de la kristana) per 6.000 vortvariantoj ne ĉie gravaj, kaŭzantaj verŝajne pro reskriberaroj. Uzante pergamenajn biblirolaĵojn, manskribitajn per antikvaj literoj (de arkeologoj nomataj "libunaj"), ne sufiĉe klarskribeblaj, ili verŝajne enkondukis neintencitajn multajn erarojn. Sed kelkloke la diferencoj estas principaj. Ekzemple tuj post la Mosea dekaloĝo sekvas ĉe ili indiko pri la altarkonstruo sur la monto Gerizim, kies sankteco estas multloke ripetata. Unu ekzemplero de biblirolaĵo, speciale gardata, estas verdire nedetermineble antikva. La samarianoj asertas, ke ĝi estas la plej origina, skribita propramane de Abiŝua, filo de Pineĥas, filo de Elcazar, filo

de Aaron la pontifiko (Ezra 7), dektri jarojn post la morto de Moseo.

Severe gardante kaj laŭvorte interpretante la bibliajn leĝordonojn la samarianoj pasigas la tutan sabatvesperon en malumo, pro la malpermezo uzi fajron. Dum sabato ili manĝas nur malvarmajn manĝaĵojn. Vendredvespere kaj sabatmatene ili kunvenas en la preĝejo. Envolvita en blankaj preĝotukoj ili staras preĝante kun la vizaĝoj kontraŭ la sankta monto Gerizim. La preĝado estas kolektiva. Ili komencas ĝin nelaŭte murmurante, sed baldaŭ la voĉoj leviĝas ĝis ĝemoj kaj elkoraj krioj. Kiam la preĝentuziasmo atingas ekzaltan, ili eksaltas kaj genufalas, klinante la vizaĝojn ĝis la tero. Poste ili leviĝas kaj denove preĝpetegas kun koraĵaj sopirĝemoj. Suferoj de du mil jaroj estas aŭdeblaj en tiuj preĝaj veoj, sonantaj kiel la lastaj akordoj de estingiĝanta vivo de popolo.

Dum pasko, pentekosto kaj tendarfestoj la samarianoj preĝas sur Gerizim. Dum la antaŭpaska vespersoleno ili publike oferas



La filoj de la nuna samariana ĉefpastro, s-ro Amran ha-Levi (maldekstre), s-ro Cedoka ha-Levi (dekstre).

tie sur dekduŝtona altaro paskoferan ŝafidon. El la tuta lando kolektiĝas tiam apud la montobazo scivolema publiko kaj eks-terlandaj turistoj por rigardi tiun nekutiman kaj antikvan riton.

La klereca stato de la samarianoj estas tre malalta. La judoj fondis por ili elementan lernejon, sed ĝi ĉesis funkcii pro arabaj ĉikanoj. La araboj de ŝchem tenas alte la standardon kun la devizo: "Ne eniru en urbon de samarianoj!".

Kiel blekas la hundeto De L. C. DEIJ

Kaŭze de artikolo en MR 3/47 oni faris al mi kelkajn demandojn, kiuj ne tuŝas ion gravan kaj esencan sed tamen estas traktindaj. Ekzemple: "Kiel okazis, ke la popoloj tiom malsame imitas la bestoblekojn — ĉiuj rigardante sian manieron pli malpli realofidela — kaj kiel oni tradukus tiujn onomatopojn en esperanton?"

Pri la unua punkto sendube ekzistas informa literaturo, kvankam ĝis nun mi neniom legis pri la afero. Propre mi do ne estas kompetenta respondi. Mi povas doni nur miajn proprajn pensojn kaj iom ludi pri la problemoj. Se laiko apud glaso da varma grogo aŭ biero kurigas la langon pri multe pli gravaj problemoj, aktuala politiko, sociologio, moralo — kial mi ne babilu pri tia naŭva demando: Kion diras la hundeto? Eble oni ridos pro ĝi — sed pli grava ol la diverslingvaj diskutoj pri la atombombo estas la fakto, ke amantaj patrinoj ĉiutage faras tiajn demandojn al siaj infanoj. "Jean, que dit le chien?" — "Johann, was sagt der Hund?" — "What says the dog, Johnny?" La lingvoj diferencas, sed sama estas la varma tono, sama la patrina feliĉo, kiam la etuloj respondas. Kaj tion vi volus detruiri per via atombombo?

Aŭskultu, kiel respondas le petit Jean, der kleine Johann aŭ the little Johnny! Ĉiuj same mallerte, same naŭve, same kor-

tuŝe... Nur la ekstera formo, la lingvo diferencas. Kiel okazis tiu dislingviĝo? Tion mi lernis de mia fileto. Li estas unu el la multaj malgrandaj Joĉjoj, la francaj, germanaj, anglaj, svedaj Joĉjoj — la brunaj, nigraj kaj blankaj, la kristanaj kaj judaj Joĉjoj, kelkjaraj buboj ne havantaj komprenon eĉ pri simpla abc-libro kaj, dank' al Dio! ne suspektantaj pri via atombombo.

Estas amuza historio. Ni havas malgrandan, makulharan hundon, laŭ mia edzino (kiu ne fordonus ĝin por mil guldenoj) el la raso de "Rubsitelojdoj". Joĉjo baldaŭ komencis atenti pri la kvarpicdulo. Entuziasme li movis la brakojn kvazaŭ flugilanta naĝbirdo. "Tji, tji, tji!" li krietis. Tio estis lia tuta vortprovizo. En bonaj libroj la infanoj komencas per paĉjo- aŭ panjovoko. Mia ekoratoris per montra pronomo. Tji = tio, tiu aŭ tie. Panjo divenprovc kompletigas ĝin: Tio estas bela, tio estas por Joĉjo — tio estas ba! (malpura). La entuziasma tji, tji, per kiu li salutis nian kolbasŝteliston, sendube signifis: "Belege! Brile! Kun tio Joĉjo volas ludi!"

La patrino instruemo tuj kaptis la okazon. "Joĉjo, kion diras la hundeto?" "Aĥ, stultaĵo, kara!" mi diris. "Kion diras la hundeto! Kiel li komprenus?" "Ni instruos," diris la edzino. "Joĉjo, kiel blekas la hundeto? Joĉjo, rigardu al panjo!" Sed la infano estis absorbita de tiu moviĝanta, sonanta, kolora io. Ordinara hundaĉo, bastardo. Por li impona manifestiĝo de la granda miraklo, la vivo.

Mia kara estas obstina virino. Dek-dudekfoje ŝi ekzemplis, ke malgrandaj hundoj diras boj! boj! Vidinte, ke mia filo ekatentas, mi ne plu volis postresti, kaj ni duope bojadis — mi base kiel sovaĝa gardhundo, la edzino orempike kiel timigita bebohundeto de riĉa fraŭlino.

Kaj vere! Jen la filo respondis la demandon, iom mallerte. "Pojj!" li diris. La konsonantoj, kiujn li kvazaŭ "legis" de sur niaj lipoj, estis nekorektaj. Sed la vokalkoloron, la tipan, aldan tembron mi tuj rekonis. La infano imitis ne la hundon mem (nek la patron) sed la patrinon! Ĉu ne okazas same al ĉiuj infanoj en ĉiuj landoj? Antaŭ ol penc balbuti la unuan vorton (sen konscio pri la signifo) niaj etuloj kun mirinda fidelo kaj kortuŝa naivo imitas jam per siaj krietoj kaj pepoj la tonon,

la tembron de la patrino voĉo. Tio klarigas parte la diverslingvecon de la onomatopeoj. Malofte temas pri rekta imito. Ni lernas la sonojn de niaj patrinoj, kaj malmulte atentante ilian imitan funkcion ni apenaŭ gardas ilin kontraŭ malrapida asimiliĝo laŭ la gepatra fonetiko.

Joĉjo estis tre kontenta pri la ĵus lernita vorto. Apenaŭ ekvidinte la hundon li jam vokas ĝin per laŭta bojboj! Tiel la primitiva sonimito fariĝis substantivo. Kaj ni, la gepatroj, senpense transprenis la novan hundnomon. "Hektor" de tiam ne plu audiĝis. — Kie estas Bojboj? (Tion ni demandis vidante la hundon tuj antaŭ nia nazo!). — Bojboj estas bona. Karesu ĝin! — Se Joĉjo ne havas apetiton: Ĉu mi donu al Bojboj? — Se li ne volas dormi: Ankaŭ Bojboj dormas. Bojboj ĉiam obeas. (?) — Kaj nia plej granda mensogo: Bojboj neniam estas malseka!

Nia sento por analogio iam kroĉis o-finaĵon al la bestonomo — Bojbojo. Kaj tiun vorton mi longe rigardis sinonimo de hundo, pli precize de Hektor. Poste mi konstatis, ke Joĉjo nomas tiel ankaŭ la katon de la najbarino kaj eĉ la ĉevalon de la legomvendisto. Ne sciante la nomojn li do etendis la signifon de Bojbojo ankaŭ al tiuj bestoj, kiuj ŝajnis al li kontentige similaj, por ke sufiĉu unu komuna vorto. Tiam procedon (en la plenkreskula lingvo ni parolas pri metaforado) li aplikis tre ofte. — Joĉjo taŝo (taso), Joĉjo ne taŝo (Joĉjo volas trinki aŭ ne trinki). — La folno dilas (la forno diras, t. e. faras sonojn). — Tiju aŭto (li montras flugmaŝinon) estas bildo (birdo).

Por bone kompreni tian ĉarman balbutlingvon necesas ofte profunda kono pri la infana psiko. "Avinjo 'cisto pikas," diris knabino vidante, ke kuracisto prenas lanceton. La avino iam donacis al la etulino kolorkraĵojn. Poste la infano nomis kraĵojn kaj plumojn avinjoj, ĉar ili kausis idean kunligon kun la kara donacinto. Nu, lanceto similas kraĵonon, kaj sekve la knabino diris: Avinjo (la kraĵono) 'cisto (de la kuracisto) pikas.

Mi kredas, ke similan lingvouzon ni trovas en ĉiuj landoj. Esperantaj familioj devus serioze kaj faksperite noti la parolojn de siaj idoj. Riĉa kolekto estus nepre kulturgrava (valora por lingva kaj infanpsikologia studoj).

Sed ni revenu al nia Bojbojo. La kato de la najbarino malofte blekas krom en la tempo, kiam ni volas ekdormi. Iun tagon Joĉjo tamen kun miro diris al sia patrino: "Tiju Bojbojo dilas maŭ!"

Similan frazon, kiu ŝajnas al mi profunde instrua, mi legis antaŭ ne longe. — Dijas ŝafo be; bojboj diras 'undo. — Ŝafojn la infano jam konis, sed ĝi kredis ilin ne parolkapablaj. Kaj jen unu el la ŝafoj malfermas la buŝon por diri ion. Poste sonis be. Tiu sinsekvo gravuriĝis en la memoro de la knabeto. — Dijas ŝafo be. — Alian fojon timigis lin subita bojado de hundo: Neatendite sonis: Boj! boj! Kiu diras tion? 'undo' — Kaj sekve: Boj, boj diras 'undo. La knabeto lernis, ke ĉiuj ŝafoj beas, ke hundoj tamen estas bonaj. Ili lasas sin karesi kaj "donas piedon". Tion kompreninte la knabo ŝanĝis la renversitan vortordon, kvazaŭ li instinkte obeus la saĝan konsilon de Plena Gramatiko: "Deviu de la normala sintakso nur, por ke la nekutima vortsinsekvo signifu ion". La infano diris do: "Ŝafo diras be, kaj 'undo diras boj." Tiu frazo bezonas nur malgrandan korekton por eniri la plenkreskulan lingvon: Ŝafo beas, kaj hundo bojas.

Kaj nun la respondo al la dua demando: Kiel ni tradukus sonimitojn en esperanton? Ni vidis, ke la primitivaj sonimitoj be kaj bo evoluis al la netaj verboformoj bei kaj boji. Primitivaj onomatopoej ne ekzistas en nia lingvo, sed ni disponas la jam finformitajn vortojn. Ni do retroiru! Zamenhof mem montris la vojon — "Mur, mur, mur! Tiel ili (kolomboj) murmuradis. — Plaŭ! ŝi ensaltis la akvon. (De plaŭdi). — Rap! rap! rap! rapidu! rapidu! kriis la anasino."

Simile ni povus diri ekzemple:

| | | |
|-------------------|-----------------------------|--------------------------------|
| be... | beas ŝafo, kapro | longe — beee |
| boj! boj! | bojas hundo | mallonge |
| bru, bru... | bruas vento | tre longe — bruuu |
| ĉirĉir, ĉirĉir! | ĉirpas cikado | mallonge sed klare |
| gra, gra! | grakas korvo | longe, kun kartava r — għaa |
| gri-gri, gri-gri! | grincas grilo, segilo | longe-mallonge |
| grr! | grumblas gardhundo, urso | |

| | | |
|-------------------|---|--|
| grum! | leono, tigro | malalte — grrumm |
| grun, grun! | gruntas porko | kartava r |
| hur, hur! | hurlas ventego | longe, kun eksploda h |
| kokeriko! | kokerikas koko | (Zamenhofa) |
| klak! | iu klakas per la manoj, la fingroj, vipo | |
| kluk, kluk! | klukas kokino | |
| knar, knar! | knaras rado, plumo | |
| (knars, knars) | sur papero | |
| krak! | krakas trabo | |
| kri, kri! | kriĉas vulturo, krias mevo | akre, kun kartava r — kħi! (kp graki) |
| kva, kva! (kvak, | kvakas rano, anaso | |
| kvak) | | |
| kvikkvik! | kvikas vanclo | |
| kvit! kvit! kvit! | kvitas pasero | rapide — Z uzis kvivit! |
| ku-ku! | kukuas kukolo | laŭ la tercio sol-mi |
| miaŭ! | miaŭas kato | |
| muh, muh! | muĝas bovoj, ventego | longe, kun h-elspiro |
| mur, mur, mur! | murmuras rivereto, popolamaso | (kp granti) |
| pep, pep! | pepas malgrandaj birdoj | |
| plaŭ, plaŭ! | plaŭdas akvo, remiloj | |
| ronk, ronk! | ronkas porko, kolera leonido, dormanto | |
| ru'ku! | rukulas kolomboj | |
| zum, zum! | zumas abelo, burdo, vespo | |

Iam kaj tiam ni povus el krudaj onomatopoej formi verbojn, ekzemple:

| | | |
|--------------|------------------------------------|----------------------------|
| breke kek! | brekekas bufo | laŭ Z-a onomatopoe |
| glu-glu-glu! | glugluas akvo fluanta el botelo | (pli bona ol kluk kluk) |
| pip, pip! | pipas musoj, kokidoj | laŭ Z-a onomatopoe |

Fleksiajn lingvojn havas t. n. ŝanĝvokalojn aŭ alternvokalojn, kiujn ili utiligas por siaj vortkonstruaj sistemoj. Flanke de aglutinaj derivaĵoj kaj vortkunmeto (el neŝanĝeblaj elementoj) tiuj lingvoj uzas tipajn fleksiajn formojn, kreitajn per ŝanĝo de la akcentvokalo. Tiaj formoj, fremdaj al la aglutina esperanto, donas al lingvoj fleksiaj apartan ĉarmon kaj apartan muzikon. Kaj tiom rutine, tiom spontanee la homoj aplikas la alternvokalojn, ke ili faras tion eĉ sen bezono kaj neceso, nur ĉar plaĉas al ili tia lingvomuziko.

Rilate al la vokaloj Zamenhof estis konsekvenca aglutinisto. Eĉ la frapetadon de horloĝo li signis per tik, tik, tik — do ne per la fleksia tik-tak. La lasta formo tamen radikikiĝis en esperanto, eble pro tio, ke ĝi estas internacia. Ankaŭ aliaj aglutinaj lingvoj havas ĝin, fr. tic-tac. Alia fremdvorto estas pif paf por signi pafon per fusilo. En mia gepatra lingvo tiaj vortoj abundas. En esperanto mi sentas ilin fremdaj, kontraŭaj al la sonstrukturo de nia lingvo. Mi preferas simplan paf! Maksimume oni povas allasi alternvokalojn, se ekzistas analogia vortparo: krek-krak (krevi-kraki), plaŭ-plonĝ (plaŭdi-plonĝi /subakviĝi/), klik-klak (klaketas kliko, iu fermas pordon).

La supraj ekzemploj rilatas al la asimilitaj onomatopeoj. Krom tio ni devas okupi nin pri la rekta sonimito, la literatura, fantazia sonimito, la interjekcioj, la plurformado k. s. Interesaj temoj. Sed mi timas, ke mi jam fariĝis tro tede teoria. Ĉi tiun fojon mi finu per jena demando de eleganta sinjorino: "Sinjoro, ĉu vi povas diri al mi la nomon de la birdo, kiu tiel ĉarme imitas la kukolhorloĝon?"

"La sorto de Richard Mahony", aŭstralia ĉefverko

De F. R. BANHAM, Melbourne

Ĉe la aŭstralia leganta publiko regas ĝenerale la opinio, ke "The Fortunes of Richard Mahony" estas la plej grava el ĉiuj aŭstraliaj romanoj. Iuj gazetaj kritikistoj jam riskis tion rekte

aserti. Tio elpuŝas la antaŭan opinion, ke tiu honoro apartenas al "Geoffrey Hamlyn," kiun verkis Henry Kingsley en 1858. Ankoraŭ ni atendas bone konsideritan takson de vere altreputaciaj kritikistoj, kiaj siatempe Dowden, Gosse, Saintsbury kaj Bury en Anglujo.

"Australia Felix" (Aŭstralia Feliĉa) la unua parto de la trilibra verko, estis eldonata 1917; ĝin sekvis "The Way Home" (La Vojo Hejmen) 1925; per "Ultima Thule" (La Ekstremo de la Mondo) fariĝis kompleta grandlaboro, kiu ricevis akklamon de la angleparola mondo kaj tiris internacian atenton al la aŭstralia literaturo, en kiu ĝia supereco longe restos nepasita.

Henry Handel Richardson estas la pseŭdonimo de la mortinta Ethel Henrietta Robertson, filino de dro W. R. Robertson, kiu venis al Aŭstralia en la 1860-oj. Ŝi naskiĝis en Melburno sed vivis longe en Anglujo. Ŝi mortis 1946. Ŝia edzo, John George Robertson, estis profesoro de germana lingvo kaj literaturo ĉe la Londona Universitato kaj mortis 1933.

Studo pri karaktero kaj destino

Tiun verkon, por kiu H. R. H.* dum dek kvin jaroj streĉis sian forton, bonaj kritikistoj komparas kun la klasikaj ĉefverkoj en la rusa literaturo. Ili ne troiĝis. En ĝia temtrakto, en profundeco de filozofia realismo, en la priskriba vasteco kaj penetra karakteranalizo ni vidas multon, kio kondukas la pensojn al Dostojevskij kaj Tolstoj. Fortkolore H. R. H. pentras per sia prozo multifacetan bildon de karakterevoluo sub la premo de diversaj medioj. La historio de Richard Mahony estas unu el la plej kortuŝaj romanoj en la mondo; lia tragedio estas de speco trovata en dramoj de Shakespeare. En la karaktero kaj personeco de tiu viro tamen estas nenio, kio esence diferencigas aŭ distingas lin de liaj samtempuloj. Homoj de lia speco abundas. Aminda, ficra, kolcrema, sentplena — en li ni rekonas nin mem. La portretoj de li kaj lia edzino Mary Turnham estas faritaj kun tiu pacienca talento, kiu estas ĉefa ingredienco de la genio.

* La verkinto konsekvence skribas tiel, sed ŝajne estas skribararo. — Red.

Mary estas bela karaktero; ŝia lojaleco kaj kuraĝo akompanas la edzon, dum li paŝas la longajn, strangajn vojojn de sia destino — en sunbrilo kaj ŝtormo, eĉ ĝis la densombra fino, kiam la cerbo fandiĝas en la nigron de frenczo kaj restas por li nur sopiro al morto. Ŝi estas unu el la heroinoj de la mond-literaturo, tamen havas la malfortojn de aliaj homoj. En ŝi kuŝas obstino nefleksebla, kiu bone bridata levas ŝin super la kontraŭbarojn de la vivo. Ĝuste tiu necedemo, kun radikoj en nesaga fiero, tamen puŝas ŝin en fatalan eraron. Ŝi kontraŭas al sia filo, "Cuffy", kiam li ricevas proponon de iu baronino Kraŭse, kiu estas impresita de lia muzika talento kaj je propra kosto volas sendi lin alilanden por instruado. La efiko al Cuffy de la patrina kontraŭeco kaj la sentomanko ĉe Mary pri la malutilo, kiun kaŭzas ŝia obstino, estas akcesora tragedio, kiu servas kiel parto de la ĉionampleksa tragedio, la vivo de Richard, la patro.

Kolorriĉa bildo de la orminejoj

"Aŭstralio Feliĉa" priskribas la vivon de Richard Mahony sur la orkampoj de Ballarat dum la ekscita tempo de la orserĉa alkuro en 1852. Li estas kuracisto de la universitato de Edinburgo kaj donas medicinan helpon al la fosistoj — estas kromokupo aldone al vendo de varoj. Li estas solece pensema, spirite for de la kruda, kverelema scenejo ĉirkaŭ si. Inter liaj amikoj estas Purdy Smith, impulsema junulo, kiu implikiĝas en la ribelon ĉe Eureka. Koloraj bildoj de la tumulto vivo en la orkampoj, inkluzive la atakon al la ministra barikado Eureka, estas plenvive prezentataj al ni. La paĝoj pri la urbo Melbourne antaŭ cent jaroj montras pasian klopodon al ekzakta detaleco. La nombro de ŝiaj figuroj rivalas la fekundon de Dickens. El tiu svarmo la figuroj de Richard kaj Mary estas ĉizitaj per aparte varma prozo, kun strekoj de genio indikantaj fundan scion pri la homa personeco. La konversacioj de Richard kun la propra animo estas gemoj de proza arto.

La unua simptomo de la tragedio, kiu kreskante ombras la tripartan verkon, estas donata, kiam Richard, post edziĝo jam

kuracisto en la urbo Ballarat, kverelas kun Mary pri la konduto de Purdy, kiu ekamis ŝin. Rapidante al subita devo profesia li ricevas sunfrapon. Post tio li kaj Mary suferas strangan spiritan malharmonion. Richard fariĝas pli melankolia, estas mordata de fantazia animpreno, kaj tio fine igas lin vendi la hejmon kaj reiri kun Mary al Anglujo.

Forta influo de medio

La dua libro, "La vojo hejmen", traktas la sentojn de Richard pro interna kontraŭdiro kaj seniluziigo en Anglujo. Naŭzita de la mallarĝmensa antaŭjuĝemo, snobismo kaj bigoteco de la negrandurba angla socio kaj de ĝia malestimo kontraŭ "koloni-anoj" li revenas al Aŭstralio. Tie la fortune fine ŝajnas rideti al li. Mindividendoj ebligas luksan vivon en la bela domo, Ultima Thule, ĉe Brajton apud Melbourne. Li ne plu praktikas sian profesion; lia fatala inklino al spirita memanalizo ricevas akcelon per la troa nenifarado. Perdiĝinta en nebulo de metafizika konjektado, li ekinteresiĝas pri spiritismo. Lia animserĉa troinklino plidenormaliĝas, ĝis li fine perdas la senton de homa kontakto kaj kunuleco. Febre li vendas la domon Ultima Thule kaj denove iras al Anglujo. Dum li kaj Mary vojaĝas en Eŭropo, li ekscias, ke ŝtele forkuris la makleristo, al kiu li konfidis sian investaĵon, kaj ke li sekve posedas malmulton. Fronte al tiu krizo kun ĝia minaco de mizera vivo la amo de Mary al la ŝiaj bataliras kuraĝe kaj triumfe.

La fina triono, "Ultima Thule", priskribas, kiel Richard malrapide menskolapsiĝas, ĝis li fine frencziĝas. Oni vaste devus scrĉi scenojn kompareblajn kun tiuj de la teruro de frenezula karcerado. La ĝismorte fidela Mary sukcesas liberigi lin el tiu infero kaj penadas mildigi por li la lastajn tagojn. Kiam la maldolĉa vivvojaĝo de Richard Mahony proksimiĝas al sia fino, la cerbo de la kompatindulo iom klariĝas, kaj per kelkaj balbutaj frazoj li atestas pri la eterna naturo de sia amo, kiu kunigis lin kun Mary dum ilia dolora pilgrimado.

Via dezertigita koro

De H. N. BJALIK*

Kvazaŭ domon, sur kiu
mankas Beno de Dio,
viajn korojn penetris anar' de Satan';
ili ridas ĝis tede
pri novkredo — Nekredo,
en orgio de moka rikan'.

Sed aperos subite
el sankteĵ' detruita
la gardist' — Malesper' lia nom' —
prenos ferbalailojn,
forbalaos la filojn
de Satano surstraten el Dom'.

La altar' de oferoj
disrompiĝos je eroj
en mallumo kliniĝos genu';
sur ruinoj oscedos,
ĝemkriaĉe vin tedos
la sovaĝa katin' — la Enu'!...

El la hebrea de J. Kohen-Cedek.

Recenzista dilemo

De S. ENGHOLM

Generala opinio postulas, ke esperanta recenzisto zorge atentu pri la lingvo en traktata verko. Por la bono de la aŭtoro kaj la legantoj li en sia recenzo bele kaj instrue katalogu kaj klarigu preserarojn, erarojn, nebonajn esprimojn, stilaĵojn evitindajn kaj imitindajn. Sincere kaj sen konsidero al persono li diru sian opinion.

* V. MR 2/47.

Tiu postulo estas komprenebla. La pli multaj legantoj de esperantaj verkoj estas, pli malpli, lernantoj. Ili deziras kaj bezonas ekscii, kia estas la lingvo en aperantaj libroj, kio estas nekorekta aŭ evitinda. Por spertaj esperantistoj atentigo pri eraroj ne estas bezonata, sed por ili analizo de esprimmanieroj kaj frazkonstruo estas kaj interesa kaj instrua.

Tamen la vera tasko de recenzisto estas alia: prezenti kaj analizi la enhavon de la libroj kaj tiel gvidi la publikon al altnivela literaturo kaj spirita pliriĉigo. Pri lingvaj aferoj de la supre nomita spoco li efektive devus okupi sin kiel eble plej malmulte. Analizo de literaturo kaj instruado de korekta uzo de vortoj kaj korekta konstruo de frazoj estas efektive diversaj taskoj kaj apartenas al diversaj ŝtupoj.

Se libro posedas enhavon, mi volas kiel recenzisto pritrakti la enhavon. Se ĝi ne posedas enhavon, ĝi ne meritas pritrakton, almenaŭ tiu estu kiel eble plej mallonga.

Samtempe mi komprenas, ke pritrakto de la lingvo en la libro estas afero tre grava, eĉ necesa: grava por ĉiuj lernantoj, necesa por la dezirinda evoluo de la lingvo. Tamen mi ne ŝatas miksi literaturan analizon kaj gramatikon. Kaj eĉ se mi konsentus fari tion, mankus loko por kontentiga prezento de la lingvo. Ĉu havas multe da senco sur deko da linioj raporti kelkajn preserarojn kaj elementkursajn erarojn sed samtempe forlasi analizon kaj sugestojn pri vortuzo kaj frazkonstruado, por kio oni bezonus eble spacon de multaj libropaĝoj? Ekzistas tradukoj, eĉ inter laŭditaj, en kiuj oni sur du, tri paĝoj trovas tiom da mallertaj kaj pezformaj frazoj, ke atentigo pri ili kaj sugestoj pri plibonigo sufiĉus por mezlonga artikolo aŭ vespera studkonveno. Tia pritrakto havus pozitivan valoron por la lingvo, senkompare pli grandan ol atentigo pri kelkaj elementaj eraroj.

La problemo estas solvinda. Recenzisto okupu sin pri la esence literatura flanko, gramatikisto pri la esence lingva. Unu persono povas eventuale plenumi ambaŭ taskojn, se ambaŭ taskoj interesas lin, sed li verku apartan artikolon pri la lingva flanko. Sed kie aperigi tiun lingvan artikolon, kiu ne trovas lokon apud la recenzo?

Federacio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando aprigas monate malgrandan sed tre interesan kaj valoron gazeton por lingva edukado: La Progresanto. Ĝi enhavas konsilojn al lernantoj, averton kontraŭ eraraj aŭ nebonaj vortoj kaj esprimoj, frazanalizojn, listojn de novaj vortoj kaj multe pli. El manuskriptoj, gazetoj kaj leteroj mi havas la impreson, ke la nederlandaj esperantistoj scias tre bone uzi nian lingvon. Se la impresio estas ĝusta, mi estas konvinkita, ke tiu fakto grandparte dependas de tiu bonega instrugazeto.

Tiam kaj tiam ĝi havas ankaŭ recenzojn, sed recenzojn ĉefe lingvajn, ĝuste laŭ la maniero, kiun mi ĵus indikis. Ili estas konsciencie faritaj, sed la amplekso de la gazeto kompreneble permesas nur resumajn tiajn artikolojn.

Por ĉiu numero de La Progresanto, kiun mi ricevis, mi pensis: Se ni havas en ĉiu lando tian Progresanton aŭ eĉ pli bone, internacian Progresanton, la lingvoscio kaj lingvokompreno estus multe pli bona ol nun. Mi supozas, ke FLE ne emas tute internaciigi La Progresanton. Ili bezonas sufiĉe multe da loko por speciala instruo al nederlandanoj. Ĉu estus eble eldoni apartan, internacian Progresanton? Aŭ ĉu estus tamen eble internaciigi la nunan (kaj pligrandigi), donante lokon en Laborista Esperantisto al la speciale nederlanda materialo? Mi, fremdulo, ja ne havas rajton eĉ sugesti ion. Mi skribas nur laŭ la ideo de miaj pensoj. Ankaŭ aliaj personoj aŭ organizoj povus ja eldoni tian revuon. Mi pensas unualoke pri la nederlandaj samideanoj, ĉar ili havas jam nauĵaran sperton pri tia gazeto.

Ekzistas abundo da esperantaj gazetoj, kaj multaj estas sensignifaj kaj nenian utilon faras. Eble povas ŝajni malprudente en tia situacio fari sugeston pri ankoraŭ unu. Tamen mi estas konvinkita ke tia lingva forumo estas tre bezonata kaj ke ĝi povus fariĝi treege valora por la flego de la lingvo kaj por altigo de la ĝenerala lingva nivelo.

La luno, diino de la nokto, ĉiam instigis la fantazion. Laŭ antikvaj konvinkoj de kelkaj popoloj, ĝi estas la okulo de iu dio. Diversaj mitologioj iel ligis la astrojn kun diaj funkcioj. La ĉinoj iam pensis, ke la ĉielo estas granda spogulo, en kiu oni vidas la lunon kiel spegulbildon de la tero. La moderna homo ne multe meditas pri la ĉielaj aperaĵoj. Pro la brua vivo li ne havas tempon rigardi supren. Ankaŭ la pala malvarmaspekta kromplanedo de la tero, la luno, ŝajnas negrava.

La astronomoj tamen eltrovis pri ĝi multajn interesajn aferojn. El siaj observoj ili kalkulis ĝian distancon de la tero je proks. 380.000 km; ĝia diametro estas 3.480 km. Unu sama lunflanko estas ĉiam montrata al la teranoj, ĉar la luno ne rotacias rilate al la tero. Tio signifas, ke la sciencistoj neniam scias pri la nevidebla duonsfero. Sed tiom pli ili scias pri la videbla duono. Tial certe indas demandi la astronomojn: Kiel estas sur la luno?

Montoj, krateroj, "maroj"

"Granda ekspozicio de estingiĝintaj vulkanoj" — tiel skizis la fama angla astronomo Sir James Jeans la lunan aspekton. Per la observiloj oni ĉie sur la luno vidas ringformajn altaĵojn, kiujn la astronomoj supozas esti estintaj vulkanoj. Ili tre similas la terajn. Kelkaj estas tiom grandaj kiom Londono. La lunobservanto Schmidt, kiu faris tre taŭgan karton de la luno, registris 32.856 kraterojn.

La luno ŝajnas vera paradizo por montgrimpistoj. Grandparte ĝi estas kovrita de krudaj ŝtonamasoj kaj sovaĝaj montoj kun akraj pintoj kaj kapricformaj fendoj. La plej alta estas Monto Huyghens, kies alto oni kalkulis je 5.800 m. Du aliaj, Hadley kaj Bradley, atingas pli ol 4.600 m. Tiuj montoj kuŝas en montaro, kiu havas la saman nomon kiel la itala montaro Apeninoj. Norde de la lunaj Apeninoj situas du montaroj, ankaŭ kun teraj nomoj: Alpoj kaj Kaŭkazo. Antaŭe ĉiuj lunmontoj ricevis nomojn de teraj montoj, sed poste la astro-

nomo Riccioli anstataŭigis ilin per nomoj de famaj astronomoj, ne forgesante sin mem.

Iam la lunobservantoj vidis ankaŭ marojn sur nia kromplanedo kaj donis al ili romantikajn nomojn ekz. Maro de Nuboj, Oceano de Ŝtormoj, Maro de Kvicto, Maro de Fekundo. Kelkaj fantaziuloj rakontis eĉ pri verdaj kulturgrundoj kaj grandaj urboj. Sed la "maroj" ne estas maroj. Ili sendube montriĝis grandegaj ebenoj, verŝajne kovritaj nur de vulkana cindro. Tamen restis la nomo maroj por tiuj ebenoj.

Ĉio malmulte pezas

Stranga fenomeno sur la luno estas la malpli granda pezo de la objektoj. La lunsociencistoj kalkulis, ke la luna gravito estas sesono de la tera. Se vi pezas 60 kg, vi pezus sur la luno nur 10 kg. Imagu la konsekvencojn. Vi povus facile levi ŝarĝojn de 200 kg, kaj neniu tera famulo en ĵetsporto povus venki vin en ĵetado, nek aliaj sportistoj en saltado, ĉar vi povus salti sesfoje pli alte ol sur la tero.

Pli gravan sekvon havis la malgranda luna gravito. La luno tute perdis sian atmosferon; aero, kiu konsistigas nian atmosferon, tute mankas. Kial aertavolo ĉirkaŭas la teron sed ne la lunon? Por povi forlasi la teron kaj flugi en la universon tera objekto bezonas rapidon de 11 km en sekundo. La molekuloj, el kiuj konsistas nia aero, miksmikse flugas per grandaj rapidoj, sed neniu el ili atingas rapidon de 11 km/sek. Luna objekto, kiu havas rapidon de 2,5 km en sekundo, povas jam flugi for de la luno.

La luntago daŭras 14 terajn tagojn; dum tiom da tempo la suno brilas kaj forte varmigas ĉion, ankaŭ eventualajn aer- aŭ aliajn gasmolekulojn. La varmo akcelas iliajn movojn ĝis rapidoj de 2,5 km/sek. Per tia rapido ili povas eskapi la lunan graviton kaj flugi en la universon. Tiel daŭras, ĝis ĉiuj gasmolekuloj perdiĝis. Tio okazis jam antaŭ tre longa tempo, kaj tial ne ekzistas aero sur la luno. Sed ne nur aero mankas, ankaŭ akvo. Se ekzistis, ĝi vaporigis pro la granda varmo, kaj ĉiu vaporo, ankaŭ konsistanta el molekuloj, simile foriĝas.

La luno estas taŭga loko por malamantoj de bruo. Ĉie regas morta silento. La fiziko instruas, ke sonoj estas vibroj de la aero. Sur la luno ne estas aero, sekve ankaŭ ne sonoj.

Vi vidas la ĉielon blua. Ĝi aspektas blua pro la disigo de la sunlumo kaŭze de la atmosfero. Ĉar atmosfero mankas ĉirkaŭ la luno, vi tie vidus absolute nigran ĉielon. Krome vi povus rigardi la stelojn ne nur nokte sed ankaŭ tage, kaj vi povus vidi multe pli da steloj ol tera ĉielrigardanto.

Ĉio tio estas konsekvencoj de la malgranda lungravito.

Vivo ne estas ebla

Se iu el la legantoj jam antaŭĝojis pro siaj grandaj kapabloj en saltado kaj ĵetado dum eventuala vizito al la luno, li nun iom seniluziĝos. La luno estas tre malagraba loko por vivaj estaĵoj. Unue la temperaturo ne estas konvena. La diferenco inter la temperaturoj de la lunsurfaco je tagmezo kaj noktomezo estas trege granda. Sur la luno la tago kiel dirite daŭras dek-kvaroble pli longe ol sur la tero. Dum tiom longa tempo la suno sen ia malhelpo lumas sur la rokan grundon. Nek atmosfero absorbas la varmon, nek nuboj baras la sunradiojn. La taga temperaturo de la lunsurfaco povas kelkloke altiĝi ĝis + 115° C; vi do povus boligi akvon tute simple sur la grundo. Eble vi opinias la lunan tagtemperaturon tro alta por vi kaj preferas tiun lunparton, kie estas nokto. Sed ankaŭ ĝi ne estas afabla, ĉar tie la frostoj atingas — 150° C.

Estas pluaĵoj kaŭzoj, kial homoj ne povas loĝi sur la luno. Ili same kiel bestoj kaj vegetaĵoj ne povas vivi sen akvo kaj aero, do ili certe ne povus restadi en tia mizera mondo.

Sur la tero ĉio estas sub la atmosfera premo. Ankaŭ por la homa korpo tio estas la natura stato. Sur la luno, kie tia premo ne ekzistas, la korpo krevus kiel la marbestoj el la profundo de la oceano, kiam ili estas levataj al la surfaco. Homoj kaj bestoj, kiajn ni konas tie ĉi, certe ne vivas sur la luno. Probable ekzistas tie nenio viva.

Tamen oni konstatis iajn ŝanĝojn sur la lunsurfaco, el kiuj la usona astronomo Pickering konkludis, ke ekzistas ia malalta formo de vivo. Blankajn makulojn, periode kreskantajn kaj

Linda
malkreskantajn, li supozis esti grajlobenoj. Se li pravis, tio signifus, ke tamen iomete da akvo kaj aero ankoraŭ restas ĉirkaŭ la luno. Tiukaze ia vivaĵo povus ekzisti. Aliaj makuloj, malhelaj kaj ankaŭ variantaj, estas laŭ la opinio de Pickering grandaj teritorioj kun vegetaĵoj. Eĉ grandajn popolojn de insektoj li kredis vidi. Ankaŭ kelkaj aliaj astronomoj rimarkis la menciitajn periodajn ŝanĝojn, sed neniu el ili opinias, ke tio nepre implicas ekziston de ia speco de vivo laŭ la imagoj de ilia usona kolego.

Ĉu estas eble viziti la lunon?

Jam delonge la homa fantazio okupis sin pri eventuala vizito al la luno. Jules Verne verkis rakonton, kiu temas pri tia vojaĝo. Ĉu vizito al la luno iam fariĝos ebla? Lastatempe la usona specialisto pri raketoj, G. Edward Pendray, kiu estas scienca kunlaboranto de la konata Westinghouse-Kompanio, serioze planis pri tiu afero. Li opinias, ke lunvojaĝo estas realigebla. La malfacilo estas trovi movenergion tiom grandan, ke la veturilo povos venki la graviton de la tero. Eble la atom-energio disponigos la bezonatan forton.

Pendray planas konkeron de la luno en kvar etapoj. Unue oni klopodos nur por trafi la lunon per raketoj. Tiuj estos senhomaj sed ekipitaj per radiosendiloj, kiuj aŭtomate komunikos diversajn fizikajn sciindaĵojn. La raketoj estos tiom fortike konstruitaj, ke la aŭtomataj sendiloj ne detruigis ĉe la surluniĝo, kvankam fakte la raketoj falos kun granda rapido sur la lunon. Tiel la sendiloj povos funkcii ankoraŭ dum kelka tempo, ĝis ilia energio elĉerpiĝis.

La dua paŝo estos sendi raketon kun kelkaj personoj. Ilia tasko estos resti dum unu luna tagnokto sur la luno kaj esplori diversajn aferojn, precipe koncerne daŭran restadon de homoj. Ilia raketo estos tiel konstruita, ke ĝi povos ne nur sendanĝere malleviĝi sur la lunon sed ankaŭ forlasi ĝin.

Poste venos la tria paŝo, instalado de daŭra posteno. Ĝia personaro devos prepari definitivon koloniigon de la luno kaj estos provizata per nutraĵoj kaj aliaj bezonaĵoj per helpo de kontinuc

alflugantaj ŝarĝoraketoj. La venkotaj malfaciloj por homrestado sur la luno estas tre grandaj. Por povi libere movi sin sur la luno, ĉiu bezonas specialan kostumon, kiu ŝirmas kontraŭ la menciitaj danĝeroj; krome aerujon por ebligi spiradon kaj okulvitrojn kontraŭ la akra sunlumo. Oni bezonas luminstalon por ke oni povu labori kaj almenaŭ iom komforte vivi ankaŭ dum la longaj lunnoktoj.

Kvare kaj fine venos fondado de definitiva lunurbo, kun fabrikoj, kie oni gajnos mineralojn, precipe radioaktivajn, ekz. uranion. Kelkaj kuraĝaj virinoj rajtos kuniri kun siaj edzoj. La lunkoloniano tamen ne povos daŭre resti sur la luno. De tempo al tempo li devos ferii sur la terglobo.

Tiu plano, kies efektiviĝo verŝajne postulos dekojn da jaroj, aspektas sufiĉe fantazia. Tamen estas kredeble, ke la homoj, venkintaj tiom da naturfortoj, iam mastros ankaŭ tiun forton, kiu tirtenas ilin ĉe la tersurfaco. Kvankam la lunsociencistoj jam multon sciigis pri la luno, pelas la homojn materia profitemo kaj la deziro per persona vizito akiri respondon al la demando: Kiel statas sur la luno?

Homa tragedio

De G. J. DEGENKAMP

Mond' de mizero, doloro, perforto,
Mondo de sango, perfido, batal',
Ĉu nur ĉagreno, teruro kaj morto,
Ĉu nur malbon' estas via fatal'?

Hom' super ĉiuj kreitoj la krono,
Kvazaŭ reganto de l' tuta natur',
Kial vi uzas, anstataŭ por bono,
Vian racion kun nura terur'?

Kial, ho hom', vi predikas la amon,
Bele rezonas pri paco kaj ver',
Kvankam vi dume instruas malsamon,
Morton semante sur tuta la tor'?

Kial, ho kial ne estas konformo
Inter parolo kaj via agad' ?
Ĉu hipokrito nur estas la normo,
Vin instiganta al vorto-parad' ?

Jaro post jaro forpasas, lasante
Vundojn profundaĵn en korp' kaj anim';
Kaj senskrupule la homo konstante
Faras sin mem sia propra viktim'.

Ĉiun novjaron la homoj eniras,
Benon fidante por si kaj la frat';
Sed, ĉu la ben', kiun buŝo deziras,
Fontas el koro? — Ho, duba agad'!

Ho, se la hom' liberigi sin povus
El konvencio, doktrino, erar';
Kiom pli ĝoja la vivon li trovus:
Sen la katenoj de prema dogmar'!

Kaj, se lin regus profunda kompreno,
Ke la sekreto de l' homa feliĉ'
Ne elmontriĝas en brua sinteno,
Sed en animo kun ama dediĉ'!

Tempon ne perdu, ho fratoj, per diro,
Kia laŭ via percept' estu mond'!
Sed realigu laŭ propra inspiro
Pacon en vi kaj en propra la rond'!

La malnova bona tempo

De EINAR HULT

Ĉu oni skribu kaj pensu pri tempo pasinta, kiam la tuta homaro suferas pro la sekvoj de la lasta mondmilito? Jes, lasu nin por momento forgesi la malgajan kaj mizeran mondon, kiu ĉirkaŭas nin kaj irigi niajn pensojn kaj intereson al la malnova tempo, kiun niaj maljunuloj tiel bele pentras kaj glorigas! Ĉu tiu tempo vere estis tiel bona kaj feliĉa, kiel oni volas kredigi? Ĉu la tiutempaj homoj ne havis zorgojn kaj malsukcesojn simile al ni, eble eĉ pli grandajn?

Ĉu la epiteto "bona" ne estas diskutibla? Kia estis efektive la vivnivelo de niaj prauloj? La historio de la faksindikata movado donas al ni timigajn ekzemplojn pri la vivnivelo de la pioniroj kaj laborsklavoj. La homoj laboris sub ege malbonaj vivkondiĉoj, kiuj ne permesis vivon en lukso kaj superfluo. La tiamaj labordonantoj laŭplaĉe decidis ne nur pri la grandeco de la salajroj sed ankaŭ pri la amplekso de la labortempo. Jam de la frua mateno ĝis la malfrua nokto la laboristoj devis sklavi por vivteni siajn grandajn familiojn.

Kiaj estis la salajroj? Se ni kalkulas laŭ la nuntempaj postuloj de la laboristoj, la salajroj estis ridinde malaltaj. Ne ekzistis fakorganizoj, kiuj defendis la interesojn kaj kundecidis pri la laborkondiĉoj, sed, kiel jam dirite, la kondiĉojn decidis kaj diktis la labordonantoj. Komprenoble la varoprezoj estis malaltaj, sed tia estis ankaŭ la vivnivelo!

Nuntempe la homoj plendas pri malkomfortaj kaj malgrandaj loĝejoj, sed kion ni dirus, se oni nun disponigus al ni tiajn loĝejojn, kiujn ricevis niaj prauloj? Kaj ni ne forgesu, ke la homoj tiutempe ne pli ŝatis hundojn kaj aliajn dombestojn ol infanojn, sed tiam ĉiu familio estis infanriĉa. Ofte loĝis kaj dormis pli ol dek personoj en unu ĉambro, kaj sekve ne estas malfacile imagi la tiaman komforton de la loĝejoj!

Por niaj prauloj la religio certe ludis pli gravan rolon, ol ĝi ŝajnas fari nuntempe. La dimanĉaj diservoj ne plu signifas tiom, kiom ili faris en tempo, kiam preskaŭ ĉiuj aŭskultantoj estis analfabetoj. Iam la pastroj estis la plej gravaj kaj eminentaj

personoj en la socio, sed kiel estas nun? Ĉu la pastra "potenco" ne iom paliĝis? Kie estas nun la infanoj de la iamaj analfabetoj? Multaj el ili nun okupis la plej gravajn oficojn! La laboristaj partioj en multaj landoj havas nun la ĉefan voĉon, kiam oni faras novajn leĝojn aŭ realigas reformojn por plibonigi la vivnivelon de tiuj, kiuj en la pasinta tempo vivis en mizero.

Se ni kredus la dirojn de niaj maljunuloj, la moralo de la nova generacio estus ege pli malbona ol en la malnova tempo. Sed ĉu ne estas modo de ĉiu generacio glorigi la propran moralon kaj klaĉi pri la junularo? Oni povas demandi, kia estis la moralo de niaj prauloj, kiuj kolektiĝis por drinkfestoj, kie la lasta danco finiĝis per interbatalo? Kaj la tiutempaj studrondoj konsistis el junuloj, kiuj kartludante kulturis sian animon! Ĉu niaj maljunuloj vere havas kialon tiel fanfaroni?

Sendube la hejmoj ludis pli gravan rolon en la malnova tempo ol nun, kiam la junuloj estas logataj kaj amuzataj de la diversaj amuzentreprenejoj. La familianoj ne plu kolektiĝas por idiliaj hejmvesperoj amuzante unu la alian per muziko, kanto aŭ belaj "fabeloj". Ne plu aŭdiĝas la hejmeca zumado de la radŝpiniloj, sed nun la radio zumadas. La homoj ne plu havas tempon por la hejmoj sed estas pelataj de ĉiama urĝo aŭ de societaj "devoj".

Jes, la nova tempo havas ankaŭ malbonajn flankojn, ĉar la plimulto de la laboristoj nun okupiĝas en la industrio, kie ili estas nur radodentoj en granda maŝinaro! La raciigemo de la industriestroj igas ilin elpensi ĉiam novajn metodojn por pli grandigi la produktadon. Interalie oni inventis labor- kaj tempostudojn. Specialistoj kontrolas per horloĝoj la minimuman tempon, ofte sekundojn, kiun la laboristoj bezonas por produkti la laborpecojn. La labortakto altiĝas tagon post tago kaj jaron post jaro. Multaj laboristoj tute detruis siajn nervojn pro la pelado ĉe la laborstabloj! Sed kion faras la sindikatoj por malhelpi la subpremadon?

Per siaj estraroj de la sindikatoj la laboristoj provas defendi siajn interesojn kontraŭ la plej teruraj sklavigantoj, sed ofte la laborkontraktoj ne estas sufiĉe favoraj kaj tute ne eblas efektive ĉesigi la tempostudojn. En kelkaj laborejoj la labor-

istoj tamen aplikas la metodon "sidstriki", se la tempostudantoj ne donas akcepteblan pagon por la farita laboro. La tempostudoj ne estas popularaj en laboristaj rondoj sed estas rigardataj kiel nova skurĝo de la laborsklavoj, kiuj ne posedas alian rikaĵon ol pli malpli kurbigitan dorson.

Kvankam ankaŭ la nova tempo entenas multajn malagrablajn laboristaro tamen grave plibonigis sian vivnivelon kaj iom post iom kreiĝas socio, kiu obligas al la iamaj servutuloj vivi hominde. Iam realiĝos la bela revo pri socio, en kiu ĉiuj dividas kaj la ĝojojn kaj la zorgojn. La malnova tempo eble estis pli idilia, sed ĝi ne estis pli bona.

Komento

Angla samideano skribas al mi:

"Mi kredas, ke ne estas bone uzi MR kiel medion por tiaj artikoloj kia La Nova Testamento (nro 4/47, p. 20—22). Se oni volas propagandi la ateismon aŭ ataki la religion, oni tion faru en ateista gazeto. Kompreneble, oni legu la Biblion kritike kaj komprenu, kaj kun ĉia rimedo ĝin kompreni; oni uzu la helpon de la historio kaj la racio kaj ĉiaj aliaj helpiloj. Tamen kvankam neniu alia libro estis tiel zorge esplorita, tiel akre kaj vane atakita, ĝi restas la plej granda kaj grava libro en la mondo, kaj tiaj malsaĝaj frazoj, kiajn skribis B. R. sur p. 22 montras la neceson, ke li mem pli profunde studu la aferon, kiun li tiel malmulte priscias."

Certe ekzistas aliaj legantoj de MR, kiuj pensas same kiel tiu samideano. Tial mi volas klarigi, kial mi publikigis ĝin.

Tiu artikolo en siaj faktaj asertoj prezentas aferojn, kiujn teologoj trovis kaj prezentis jam longe antaŭ nia tempo. Al tiu scienca esploro de la Biblio ĝi aldonas nenion novan. Krome ĝi estas tiom resuma kaj havas tiom da subjektivaj valorprijuĝoj, ke oni ne povas nomi ĝin vera artikolo. Tial mi metis ĝin sub la rubrikon Debato.

Mi ĉiam deziris, ke debatoj pri traktindaj temoj okazu en MR, kaj ke ĉiu povu libere paroli, kondiĉe ke li sincere parolas kaj ankaŭ sincere kaj serioze rezonas — eĉ se la rezonado estas erara. Bedaŭrinde montriĝis malmulte da emo por tia pensa aktiveco.

Laŭ mia kompreno Rippstra sincere kaj serioze prezentas siajn konceptojn, kaj li faras tion, laŭ sia vidpunkto, por la bono de la homoj. Li esprimas subjektivajn prijuĝojn per fortaj vortoj, sed laŭ mia kompreno ili estas ne insultoj sed nur sincera esprimo de lia rezonado kaj lia amo al vero, laŭ lia koncepto de vero. Kaj laŭ mia kompreno estas ne nur ĝuste sed eĉ bone, ke li rajtas kaj povas prezenti siajn pensojn. Per silentigo oni faras servon al neniu, nek defendas Bibliion kaj religion.

Rippstra trovas grandajn mankojn en la religioj kaj grandajn erarojn kaj mankojn en la Biblio. Li konkludas el tio, ke religioj kaj la Biblio entute kaj en si mem estas io malbona, io kontraŭvera. Li kritikas kaj atakas aferojn, kiuj laŭ la rigardmaniero de multaj homoj estas negravaj, sed la esencajn valorojn li ne komprenas kaj eĉ ne perceptas — se oni rajtas konkludi laŭ liaj artikoloj.

Kaj tamen li rajtu paroli! Se vi kiel kristano aŭ humanisto trovas lian rezonadon erara, vi analize pruvu, ke li malpravas, rezonade montru, ke ekzistas pli bona kaj perfekta pensmaniero. (Mi kompreneble parolas nur pri aferoj, pri kiuj oni *povas* rezoni).

Laŭ multaj — kaj ankaŭ laŭ mi — la angla samideano pravus, kiam li volas defendi la Bibliion. Sed — same kiel oni per asertoj ne senvalorigas la Bibliion, oni ankaŭ ne per asertoj komprenigas al iu ĝian valoron. Ankaŭ la esprimo "malsaĝaj frazoj" estas subjektiva valorprijuĝo. Tamen mi ne riproĉas lin pro tio, ĉar laŭ ĉio liaj linioj estas skribitaj ne kiel respondo en debato sed nur kiel privata rimarkigo al la redaktoro de MR. Ĉiukaze — se oni volas refuti sinceran rezonadon, oni refutu per sincera rezonado.

Sed ĉu entute havas sencan rezonadon pri tia temo?

Mi kredas ke jes. En nia tempo tre granda parto de la homoj, en multaj landoj la pli granda, vivas sen normoj. En pasintaj

tempoj la homoj trovis vivogvidon en la normoj de la religioj — ne nur de la kristana — kaj en moroj devenantaj grandparte el la religioj. Certe temis ofte pri sklava sekvo kaj foje ankaŭ pri diktatora devigo. Tamen normoj ekzistis, kaj oni respektis ilin. Eĉ homoj agintaj kontraŭ ili tamen rekonis, ke pravaj estas ne iliaj malbonaj agoj sed la normoj.

Kiam la homoj grandparte perdis sian kredon religian, ili perdis ankaŭ la normojn, la senton pri ilia valoro kaj neceso.

Se la homoj en iu relative bonorda lando ankoraŭ vivas sufiĉe bonorde kaj homece, tio dependas ĉefe de kutimoj kaj de ĝis nun favoraj cirkonstancoj. Kiam la tiel nomataj psikologoj pretendas, ke la moralo estas rezulto sole de cirkonstancaj eksteraĵoj influoj al la homa korpo (inkluzive la cerbon), kaj tio estas rigardata kiel filozofio kaj scienco, tiam ne plu troviĝas loko por konstantaj, universalaj normoj. Tiam ĉiu povas tute logike diri, ke permesata estas ĉio, kio plaĉas al mi kaj estas utila al mi. La sekvoj de tia vivkoncepto estas videblaj en la vivo de unuopaj homoj kaj homgrupoj kaj ankaŭ en la vivo de la ŝtatoj. Tia koncepto povas konduki nur al ĉies batalo kontraŭ ĉiu, al detruo, al dissolviĝo de ordo kaj homeca vivo.

Estus sencece diri al homoj kredantaj je nenio: "Vi devas kredi je Dio kaj la dek ordonoj kaj tiuj kaj tiuj aferoj. Alie via animo kaj la homa socio pereos." Ili ne komprenus, ne povus kompreni. Sed mi kredas, ke ili almenaŭ *povas* kompreni, kaj foje eventuale eĉ komprenas, se oni klarigas al ili, ke tiaj universalaj, konstantaj normoj estas absolute necesaj por sana daŭrigo de individua kaj socia homa vivo. Kaj se ili tion komprenos, ili baldaŭ komprenos ankaŭ la esencan enhavon de la dek ordonoj kaj aliaj similaj nun malŝatataj "religiaj aferoj".

Mi kredas, ke tiaj diskutoj ne estas senutilaj. Neceso kaj severa sperto estas niaj solaj plene efikaj instruistoj, sed serioza interŝanĝo de pensoj kaj serioza serĉado de vero ankaŭ povas eduki nin. Kaj ni ne bezonas nepre diskuti teorie kaj abstrakte. Troviĝas kontentige da konkretaj aferoj en la ĉiutaga individua kaj socia vivo.

Stellan Engholm

Literaturo

J. C. Heer: Ĉe la sanktaj akvoj, unua parto.
Trad. A. Bader, P. le Brun, J. Schmid.
Prezo svisaj fr. 3,05.

Du amosentaj noveloj.
Trad. Alfred Bader.
Prezo svisaj fr. 2,05.
Ambaŭ librojn eldonis Svisa Esperanto-Societo.

"Ĉe la sanktaj akvoj" estas romano pri homoj en svisa alpvilaĝo, kiuj travivas transiron de netuŝita kampara izoleco al moderna turistindustria tempo. La rakontado estas tipe provincromana, honeste kaj bone farita. Vi renkontas en tiu libro interesajn homtipojn, konfliktojn eksterajn kaj internajn, streĉajn situaciojn. La libro apartenas al la plej legindaj de niaj pli novaj rakontotradukoj.

La lingvo estas bona kaj flua. Kelkaj eraretoj kaj plibonigebblaj aferoj restas, sed ili ne multe ĝenas kaj neniel detruas la ĝeneralan impreson.

La preso estas tre klara en la presmetie altkvalita libro, sed la literaro estas laŭ mia gusto tro malgrandspeca por tiom granda formato. Kredeble influas al tio manko de papero. Tamen oni kun la sama literaro sed malgranda formato ricevas pli plaĉajn kaj multe pli facile legeblajn paĝojn.

Oni informas, ke la dua parto baldaŭ aperos. Poste la tuta libro estos havebla ankaŭ en unu bind. volumo por 7,10 svis. fr.

La du amosentaj noveloj de la sama eldonejo estas Imenlago de Theodor Storm kaj Maruŝka de Mela Escherich. Storm estis granda verkisto, kaj multaj el liaj verkoj restas kaj longe restos plenvivaj. Imenlago certe estas kalkulita kiel klasika verko, sed al mi ŝajnas, ke mi jen kaj jen preskaŭ aŭdas la tonon de parodio de klasika romantika verko, almenaŭ en la esperanta traduko.

Imenlago iomete faras tian impreson, sed la novelo Maruŝka plene efikas kiel tia parodio (ĉio laŭ mia subjektiva percepto).

Tiu libro ŝajnas al mi aparteni al la superflujaj (se mi ne kalkulas la literaturhistorian valoron de Imenlago). La lingvo de la traduko havas multajn mankojn.

*

Agostinho da Silva: La Budhismo.
Agostinho da Silva: La prahistoria arto.
Ambaŭ tradukitaj de José de Freitas Martins.
Prezo po 2 rpk.
Eldonis Portugala Eldona Rondo.

Elementaj, tre bonaj traktoj de la temoj budhismo kaj prahistoria arto. La lingvo en ambaŭ estas bona.

*

Versaĵoj de JoE.
Ricevebla de la aŭtoro:
2 Cambridge st., Willoughby, N. S. W. Aŭstralio.

*

Iom pli ol 50-paĝa multobligita kajero kun versaĵoj (la titolo estas adekvata) de tre diversaj specoj, flue kaj verstante verkitaĵ. La libreto estas senpage ricevebla, sed ĝentila petanto povas ja tamen sendi respondkuponon por pagi afrankon.

*

Tage Lindbom: Sveda laborista movado.
Tradukis Martin Johansson.
Eldonis Sveda Laborista Esperanto-Asocio, Barnhusgatan 8, Stokholmo.
Prezo: en Svedujo 1 kr., al eksterlando kontraŭ 2 rpk.

Jen tre prudenta utiligo de esperanto! En ĉ. 90-paĝa, bela, ilustrita libro vi ricevas faktoriĉan priskribon pri la socialdemokrata movado en Svedujo kaj ĝiaj klopodoj kaj atingoj en ekonomiaj kaj kulturaj kampoj kaj samtempe bildon de la ĝenerala evoluo en la lando ĝis la nuna tago. Nepre mendu la libron! La enhavo certe meritas tion, kaj krome vi povas tiel pligrandigi la intereson por esperanto en laboristmovadaj rondoj kaj en via lando kaj en Svedujo.

Al kunlaborantoj

Mi volas, ke MR estu kiel eble plej multe spirite memstara revuo, esprimu de propra spirita aktiveco de esperantistoj. Por atingi tion, ĝi devas havi kiel eble plej multe da efektive originalaj artikoloj, originalaj ne nur lingve sed ankaŭ enhance. Ili donu novajn vidpunktojn, impulsojn, prezentu al la legantoj ion

efektive pozitivan. Tio ne signifas, ke ili nepre postulas vastan erudicion. Simplaj klarvidaj observoj pri la ordinara homa vivo, serioze pripensitaj, povas doni multe da valoraj instigoj. MR jam donis ne malmulte da tiaj artikoloj, sed ili estu ankoraŭ pli multaj, kun ankoraŭ pli da efektiva, rekta rilato al ni mem kiel homoj, al nia vivado kaj niaj klopodoj.

Per tio mi ne kondamnas kompilartikolojn. Se la temoj estas bone elektitaj kaj la artikoloj bone verkitaj, ili povas havi grandan valoron, kaj ili estas necesaj por vario. Sed ankaŭ pri ili validas la sama postulo kiel por enhave originalaj artikoloj: ili estu ne nur materialo por kelkminuta legado, sed donu al la legantoj iom da pozitiva pensinstigo. Temelekto estas tre grava. Estus sensece prezenti tiajn aferojn, kiujn ĉiu povas legi en la gazetoj kaj elementaj lernolibroj de sia gepatra lingvo. Tamen mi supozas, ke inter la esperantistoj ekzistas multaj fakuloj en diversaj sciencaj kampoj kaj ankaŭ multaj amatoroj, kiuj estas lertaj kaj havas proprajn spertojn pri siaj ŝataĵoj. Ili donu sian kontribuon al nia konstruado.

Kaj fine pli banala deziro: Skribu kun tuta liniinterspaco, se vi skribos maŝine! Tio liberigos min de multe da skribado. Estas nek ĝentile nek praktike sendi densskribitajn paĝojn al kompostistoj, kiuj ne scias esperanton. Foje oni krome bezonas iom da loko por ev. ŝanĝoj.

S. E.

Oni plendas

kaj prave, ke MR estas multekosta. Ekzistas unu sola rimedo por malkarigi ĝin. Se ĝi havus mil abonantojn aŭ iom pli, estus eble duobligi ĝian amplekson. Tiel ĝia prezo estus nur duono de la nuna.

Korespondu

Dipl.-ing. Karl Wicneke, Schillerstrasse 5, (24a) Geesthacht-Elbe, Germanujo, deziras korespondi kun teknikistoj kaj scienculoj pri problemoj, kiuj koncernas ekstermadon de ratoj, precipe en urboj.